Christian Morgenstern,

Antaŭprintempo

tradukita de Manfredo Ratislavo

Suspiras nokte la degel';
timiga estas tio ĉi.
Trankvile estas ĉie, el
la dorm' vekiĝis mi.

Rompiĝas de l' glaci rempar'[3]
sur la akvejoj ĉie ĉi;
kunmortas kvazaŭ ankaŭ mi
kaj reviviĝas el glaci' [4]
kaj fluas al la mar'.

Ripozas ĉio en silent'.
Nur jen kaj jen en iu dom'
vekiĝas, ploras, ridas hom'
laŭ la degela vent'.

Traduko de la Germana poemo "Vorfrühling" de Christian Morgenstern *(Kristiano Matenstelo, ∗1871-05-06 – †1914-03-31) en Esperanton de* Manfredo Ratislavo *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04) en 2003-02.23.*

Arg-79-155 (2003-11-03 10:14:06)

[3] aŭ: Rompiĝas la glaci-rempar'.
[4] aŭ eble: kaj resurektas el glaci'